

Carl Riedel,  
Venu, paŝtistoj

*tradukita de Manfredo Ra-  
tislavo*

Venu, paŝtistoj,  
Vi homoj al ni!  
Venu kaj vidu  
La filon de Di'!  
Kristo hodiaŭ  
Por vi naskiĝis,  
Via Savanto  
Li elektiĝis.  
|: Ne timu vi! :|

Venu rigardi  
Vi tion kun ni,  
Kion promesis  
Ĉiel-melodi'!  
Kion vi trovos.  
Ni diskonigu,  
Kaj la Sinjoron  
Ni honorigu!  
|: Haleluja! :|

Estas ĝojego  
Por la paŝtistar',  
La sciigaĵo  
De la anĝelar':  
Inter la homoj  
Nun iĝu paco  
Kaj sur la tero  
La Dia graco.  
|: Al Di' honor! :|

...

Carl Riedel,  
Kommet, ihr Hirten

Kommet, ihr Hirten,  
Ihr Männer und Fraun!  
Kommet, das liebliche  
Kindlein zu schau!  
Christus, der Herr,  
Ist heute geboren,  
Den Gott zum Heiland  
Euch hat erkoren.  
|: Fürchtet euch nicht! :|

Lasset uns sehen  
In Bethlehems Stall,  
Was uns verheißen  
Der himmlische Schall!  
Was wir dort finden,  
Lasset uns künden,  
Lasset uns preisen  
In frommen Weisen.  
|: Allelujah! :|

Wahrlich, die Engel  
Verkündigen heut  
Bethlehems Hirtenvolk  
Gar große Freud:  
Nun soll es werden  
Frieden auf Erden,  
Den Menschen allen  
Ein Wohlgefallen.  
|: Ehre sei Gott! :|

...

Carl Riedel,  
Aŭdu, paŝtistoj

*tradukita de Albrecht Kro-  
nenberger*

Aŭdu, paŝtisto,  
mi diras al vi  
Bonan sciigon  
pri l' Filo de Di':  
Enkarniĝinta,  
ĵus naskiĝinta,  
Ĉirkaŭvindita,  
entrogigita.  
Gloron al Li!

Vidu, homidoj,  
la amon de Di'.  
Malsupreniris  
la Vorto por vi.  
Kruce murdota,  
entombigota,  
Resurektonta,  
ĉiel-irona.  
Gloron al Li!

Venu, kristanoj,  
rapidu al Li,  
Kiu bebiĝis  
en stalo por vi.  
Miru ĝojante,  
kore kantante,  
Genufleksante,  
Lin adorante.  
Gloron al Li!

...

Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de CARL RIEDEL (\*1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982.

MR-014-3 / Arg-565-1140 (2010-09-20 10:01:32)

La muziknotojn vidu jen: [http://www.lieder-archiv.de/lieder/show\\_song.php?ix=200038](http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038).

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas CARL RIEDEL (\*1827-10.05 – †1888-06-03).

Arg-565-1139 (2012-12-26 14:08:58)

Vidu ankaŭ la retejon <http://ingeb.org/spiritua/kommetih.html> kaj la muziknotojn jen: [http://www.lieder-archiv.de/lieder/show\\_song.php?ix=200038](http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038). Aŭdeblas la melodio jen: <http://ingeb.org/Lieder/kommetih.mid>. Vidu ankaŭ: [http://www.lieder-archiv.de/kommet\\_ihr\\_hirten-notenblatt\\_200038.html](http://www.lieder-archiv.de/kommet_ihr_hirten-notenblatt_200038.html).

Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de CARL RIEDEL (\*1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de ALBRECHT KRONENBERGER (\*1940-01-21) en 1990.

Arg-565-1142 (2010-09-20 11:11:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la retejo <http://reocities.com/cigneto/thctxt/a/auxdupasx1.html>.